

# **Protokolo pri la kunveno de la Komitato de TEJO en la 71-a Internacia Junulara Kongreso, Vizbadeno 2015**

**Unua sesio** (lundo, la 3-a de aŭgusto 2015)

## **01 MALFERMO**

Je la 10h25 la prezidanto Łukasz Żebrowski bonvenigas la komitatanojn. Li pardonpetas pro loĝistikaj problemoj kaj anoncas, ke la sekvaj sesioj okazos en alia, pli granda salono.

Żebrowski informas, ke la Komitato konsistas nun el 49 personoj. En la salono ĉeestas 29 komitatanoj kaj anstataŭantoj, sekve la kunveno estas kvoruma. La listo de la ĉeestantoj estas apendico de la protokolo (p.11-12).

## **02 PROPONOJ PRI LA KOMISIONOJ**

### **02.01 Voĉdona komisiono**

Por la voĉdona komisiono sin proponas Rogier Hurman kaj Michal Matúšov.

### **02.02 Propona komisiono**

Por la propona komisiono sin proponas Enric Baltasar. Żebrowski proponas Veronika Venislovas.

Ĉiuj kandidatoj por la voĉdona kaj propona komisionoj estas akceptitaj en unu voĉdono per 28 voĉoj.

## **03 FIKSO DE LA CETERA TAGORDO**

Żebrowski prezentas proponon pri la tagordo de la kunveno:

Unua sesio (3 aŭgusto 2015)

- 01 Malfermo
- 02 Propoj pri la komisionoj
  - 02.01 Voĉdona komisiono
  - 02.02 Propona komisiono
- 03 Fikso de la cetera tagordo
- 04 Jura sendependiĝo de TEJO
- 05 Starigo de laborgrupoj
- 06 Raporto de la Elekta Komisiono

Dua sesio (4 aŭgusto 2015)

- 07 Elekto de la Estraro
- 08 Elekto de la Elekta Komisiono
- 09 Aliĝpeto de BOJE

Tria sesio (6 aŭgusto 2015)

- 10 Amendoj al la Strategia Laborplano de TEJO 2014–2017
- 11 Raportoj de la laborgrupoj
- 12 Jura sendependiĝo de TEJO – decido
- 13 Ceteraj demandoj

La tagordo estas akceptita unuanime.

#### **04 JURA SENDEPENDINGO DE TEJO**

Michael Boris Mandirola prezentas la aferon. TEJO estas la junulara sekcio de UEA kaj ties integra parto. En 2008 okazis registriĝo de TEJO ĉe la Komerca Ĉambro de Roterdamo, sed temas pri *asocio kun limigita jura personeco*. Tio kreis kelkajn problemojn pri subvencipetado, kiuj estis poste solvitaj, tamen restas malsimpla situacio, kiu jam en la pasinteco perdigs kelkmilon da eŭroj – ĝuste pro la fakto ke TEJO, kvankam memstara organizaĵo, restas sen jura personeco. Tio estas komplika strukturo. Krome, se TEJO volas esti aktiva en la kadro de eksteraj rilatoj – kio ja okazas – ni devas plenumi la postulojn de la ekstera mondo, kiu volas, ke la junulara organizaĵo estu plene sendependa kaj gvidata de la junularo. Ĉar ni estas tre aktivaj, ni atingis jam la punkton, en kiu la ŝanĝo de la statuso iĝis io grava, fundamenta kaj ne plu prokrastebla.

Antaŭ du jaroj la Komitato de UEA starigis laborgrupon por esplori la juran statuton de TEJO kaj la unua parto de ĝia laboro estis prezentita en la 100-a UK: temas pri la statuto de TEJO kaj la kontrakto inter TEJO kaj UEA. En la antaŭa semajno la komisiono prezentis al la Komitato de UEA malnetan proponon de tiuj dokumentoj. La fakto, ke ni volas iĝi sendependa organizaĵo, ne signifas, ke ni volas rompi la kontaktojn inter TEJO kaj UEA. La laborgrupo pritraktis ĉefe la statuton kaj nun eblas prezenti novan malneton de la statuto, kiun espereble la komitatanoj jam legis en la komitata diskutlisto. UEA starigis limdaton por finredakti la dokumentojn ĝis la 31-a de oktobro 2015. Se TEJO volus enkonduki iujn ŝanĝojn en la statuto, ĝi devus esti resendita por la akcepto de la Komitato de UEA. Se ni akceptos ĝin en ĝia nuna formo, ĝi estos sendita al fakulo pri nederlanda juro, kiu korektos malprecizaĵojn kaj erarojn.

La Estraro ene de tri monatoj faros proponon pri la kontrakto, kiu estos poste traktita kun la Estraro de UEA. La Komitato de UEA kun grandega plimulto esprimis sian fidon al la proponita statuto kaj la proceduro; la Komitato de TEJO faru nun la finan paŝon por plu iri ĉi tiun vojon.

Roland Goodbody demandas pri la avantaĝoj de la ŝanĝo de la jura statuso de TEJO. Mandirola respondas, ke temas pri simpligo de la situacio kaj plenumo de la kriterioj de la ekstera mondo. Veronika Poór demandas ĉu tiu ŝanĝo estas grava por FoJE. Mandirola respondas, ke la jura sendependeco estas por FoJE unu el la kriterioj por membreco. Tio signifas, ke se okazus kontrolo de TEJO – kaj similaj kontroloj okazas ĉiujare pri 2–3 organizaĵoj – nin trafus vere granda problemo, ĉar oni poste ankoraŭ dum jardekoj havus malbonan opinion pri Esperanto kaj trovus nin trompemuloj. Rogier Hurman demandas, ĉu post ĉi tiu ŝanĝo la kasisto de TEJO havos pli da rego ol nun. Mandirola respondas ke la proponata statuto intence estas tre ĝenerala, la detalojn regulos la kontrakto inter TEJO kaj UEA. Hurman atentigas, ke la kontrakto ankoraŭ ne estas skizita. Mandirola respondas, ke ekzistas malneto

kaj la Komitato starigu laborgrupon, kiu estas bonvena doni indikojn pri la enhavo. Tobiasz Kubisiowski demandas pri la membrosistemo: kio okazos kiam UEA kaj TEJO estos apartaj? Mandirola respondas, ke la laŭ la intencoj, la individuaj membroj de TEJO plu estu ankaŭ individuaj membroj de UEA – tiun aspekton la ŝanĝo ne tuŝos. La nura demando estas pri eksigo de membro, ĉar en tiu kazo membro povas esti forpelita nur se ambaŭ organizaĵoj konsentas pri tio.

Giorgio Silfer petas parolrajton. Videbla plimulto de la komitatanoj konsentas. Silfer diras, ke la vortumo devas esti, ke la Komitato de UEA “ratifas” kaj ne “aprobas”. Krome, li aldonas ke TEJO gardas certan privilegion pri kiu UEA verŝajne ne konscias. Nome, la TEJO-membroj povas fariĝi estraranoj de UEA, dum ne estas inverse por UEA-anoj super 30 jaroj. Do, nun TEJO havas iun forton, kiun ĝi ne havis ĝis nun.

La Komitato starigas laborgrupon por trakti la aferon: studi la statuton kaj fari rekomendon pri ĝia aprobo aŭ amendo kaj ellabori rekomendojn al la Estraroj de TEJO kaj UEA pri la kontrakto. Sin proponas por la komisiono: Huurman, Mandirola kaj Zuzana Kozuchová. Estas ankoraŭ proponitaj: Nguyen Thi Nep, Emanuele Regano, Dorota Rodzianko, Matúšov kaj Baltasar. Ĉiuj proponitaj personoj konsentis labori en ĉi tiu laborgrupo.

La Komitato starigas la laborgrupon per videbla plimulto de voĉoj.

## **05 STARIGO DE LABORGRUPOJ**

Ne estas starigitaj aliaj laborgrupoj.

## **06 RAPORTO DE LA ELEKTA KOMISIONO**

Romualda Jeziorowska estas la sola membro de la Elekta Komisiono, kiu partoprenas en la kongreso. Ŝi prezentas la raporton de la komisiono. Ĝi ricevis kompletajn kandidatiĝojn de 9 personoj kaj rekomendas elekti 8-personan estraron. La Estraro mem elektu inter si du prezidantojn. Rekandidatas 3 estraranoj.

La kunsido finiĝas je la 11h26.

## **Dua sesio (mardo, la 4-a de aŭgusto 2015)**

La kunsido komenciĝas je la 10h10. Ĉeestas 26 komitatanoj, sekve estas kvorumo.

## **07 ELEKTO DE LA ESTRARO**

Huurman volas prezenti amendon al la tagordo kaj aldoni punkton pri petskribo de kelkaj komitatanoj. Żebrowski respondas, ke tio rilatas al la elekto de la Estraro kaj povas esti konsiderata kiel parto de la tagorda punkto 06.

Huurman voĉlegas la petskribon.

*Ni, la subskribantoj,*

konstatante, ke en la nuna estraro estas du estraranoj pretaj kaj kapablaj (re)igi prezidanto, Łukasz Żebrowski kaj Michael Boris Mandirola, rimarkante, ke laŭ la propono de la elekta komisiono estos nur unu kandidato por la posteno de prezidanto, kalkulante, ke la nuna prezidanto jam finis du oficperiodojn, legante, ke la nova statuto proponita de tiu ĉi estraro malpermesos pli ol du sinsekvajn oficperiodojn kiel prezidanto,

*insiste petas, ke dum tiu ĉi komitatkunsido Michael Boris Mandirola ankaŭ kandidatiĝu por la posteno de prezidanto, Łukasz Żebrowski ankaŭ kandidatiĝu por la posteno de alia estrarano, por ke estu elekteblo por tiu ĉi komitato.*

Rogier Huurman, komitatano A (NEJ)  
Alexandre Raymond, estrarano  
Rowland Goodbody, komitatano A (JEB)  
Venislovas Veronika, anstataŭa komitatano A (HEJ 2x)  
Meva Cuenot, komitatano A (JEFO)  
Timm Penno, komitatano A (GEJ)  
Zuzana Kozuchova, anstataŭa komitatano A (SKEJ kaj IEJ)  
Vit Guiglermo Misurec, komitatano A (ĈEJ)  
Michal Matusov, komitatano A (EUROKKA)  
Sarah Pereira Moneiro, anstataŭa komitatano A (BEJ)  
Pau Codina, komitatano A (KEJ)  
Arina Osipova, komitatano A (REJM)  
Emanuele Regano, komitatano A (IEJ)

Mandirola respondas, ke lige kun la petskribo kaj volo de la komitatanoj, li kandidatiĝas por la posteno de prezidanto. Żebrowski respondas, ke li ne pretas kandidati por alia estrara posteno.

La Komitato elektas la nombron de la estraranoj. La Elekta Komisiono proponas, ke la Estraro konsistu el 8 personoj, Regano proponas 7, Rodzianko proponas 5.

Kožuchová opinias, ke malpli granda Estrara signifas ŝparon de mono por aliaj agadoj, ĉefe kiam temas pri vojaĝoj de estraranoj el foraj landoj. Żebrowski atentigas, ke tio estas kosto de tutmondeco. Huurman demandas al Żebrowski, kiu havas spertojn labori en granda kaj malgranda estraroj, kiel funkcias la aferoj depende de la nombro de estraranoj; ĉu estis problemoj en malgranda estraro? Żebrowski respondas, ke jes, estis problemoj. En certa momento laboris nur tri estraranoj kaj tio estis koŝmaro. Nun, kun la administra subvencio, ni ne devas limigi nin pro financoj – oni povas kovri la kostojn el la subvencio, ja por tio ĝi estas. Rodzianko demandas kial oni perfortas, ke estu estraranoj el la tuta mondo; multaj el la kandidatoj estas komitatanoj kaj ili povas aktivi en tiu rolo, ni povus havi pli viglan Komitaton; ĉu vere necesas altrangigo? Krome, ŝi ne komprenas kial TEJO bezonas tiom da estraranoj, se la Komitato havas decidan voĉon kaj ĝi povas fari multon. Ankaŭ Ariadna García Gutiérrez opinias, ke la Estraro ne devus esti granda, sed aliflanke, kiam mankas reprezentado de iu kontinento, tiam mankas al ĝi atento flanke de la Estraro.

Paweł Fischer-Kotowski atentigas, ke verŝajne du el la kandidatoj ne estas individuaj membroj de TEJO: Alexandre Raymond kaj Juliana Evandro. Raymond diras, ke li estas dumviva membro, Evandro aliĝis per BOJE.

Rodzianko demandas pri kio okupiĝas la Estraro. Żebrowski respondas, ke ĝi plenumas la decidojn de la Komitato, sed tio ne signifas, ke ĝi faras la tutan laboron de la organizaĵo.

Kožuchová demandas kiom el la nunaj 7 estraranoj vere laboris. Żebrowski respondas, ke tio dependas de la periodo, komence laboris ĉiuj; sed poste iuj malaktiviĝis. Li ne volas diri la nomojn, sed konstatas, ke tio videblas laŭ la cirkuleroj.

Judith Meyer demandas kial la Elekta Komisiono venis al la rekomendo pri 8 estraranoj, se nun funkcias 7-persona teamo. Jeziorowska respondas, ke sin anoncis bonaj kandidatoj. Aldone, la komisiono volas ke estu pli da virinoj en la Estraro kaj en la 8-persona propono povas esti egale po kvar viroj kaj virinoj. Ne necesas malpara nombro de estraranoj. Cédric Marchal aldonas, ke tiuj, kiuj ne estos elektitaj, eble malpli aktivos.

En la voĉdono pri la nombro de estraranoj 12 komitatanoj subtenas la proponon pri 5-persona Estraro, 4 komitatanoj tiun pri 7-persona kaj 7 voĉdonas por la 8-persona Estraro. 2 komitatanoj sin detenas. Ĉar neniu propono ricevis subtenon de pli ol duono de la komitatanoj, okazas plia voĉdono pri la du plej popularaj proponoj: 5- kaj 8-persona Estraro.

La Komitato akceptas proponon pri 5-persona Estraro per 15 voĉoj kontraŭ 7 voĉoj, kiuj subtenas 8-personan Estraron. 1 komitatano sin detenas.

Rodzianko demandas ĉu ĉiuj komitatanoj ricevis kaj legis la raporton de la Elekta Komisiono kaj ĉu okazos sinprezentadoj antaŭ la voĉdonado. Żebrowski respondas, ke neniam ekzistis praktiko fari sinprezentadojn, ĉar tio malavantaĝigus kandidatojn, kiuj ne partoprenas en la kongreso.

Meyer proponas ŝovi la tagorderon al la sekva kunsido kaj nun okupiĝi pri aliaj punktoj. La Komitato decidas, ke unue sin prezentu Benina Organizo de Junaj Esperantistoj (BOJE), kiu volas aliĝi al TEJO kiel landa sekcio en Benino.

## **09 ALIĜPETO DE BOJE**

Bernard Gnancadja, la prezidanto de BOJE, kaj Latifou Gbadamassi prezentas la historion kaj agadojn de la organizaĵo.

Huurman demandas kiom da membroj havas BOJE. Gnancadja respondas, ke temas pri 25 personoj. Michal Matúšov demandas pri la aspiroj de BOJE kaj profitoj de la aliĝo al TEJO. Gnancadja klarigas, ke temas pri la internacia etoso; Benino povos gastigi internaciajn Esperanto-aranĝojn. Rodzianko demandas pri la raporto de la laborgrupo pri la aliĝo. Mandirola respondas, ke kelkaj statutaj eroj estas modifitaj laŭ la rekomendoj de la laborgrupo kaj nun la organizaĵo estas preta por aliĝi al TEJO. Kubisiowski atentigas, ke devas okazi sekreta voĉdono.

En sekreta voĉdono la Komitato de TEJO akceptas BOJE kiel landan sekcion de TEJO per 23 voĉoj por, 3 sindetenoj kaj 2 nevalidaj voĉoj.

## **06 ELEKTO DE LA ESTRARO – daŭrigo**

La Komitato per videbla plimulto decidas, ke la nova Estraro mem elektu la vicprezidantojn.

Matúšov demandas al Ŝebrowski kion li faros, se la Komitato volus lin en la Estraro, sed ne en la posteno de prezidanto. Ŝebrowski respondas, ke li ne havas tempon por analizi tiun proponon nun. Li nur hodiaŭ eksciis, ke Mandirola kandidatas kontraŭ li. Laŭ li, se la Komitato opinias, ke la organizaĵo bone progresas sub lia gvido, ĝi reelektu lin. Se ne, la Komitato rajtas elekti novan prezidanton. Se li ne estos reelektita, li tute ne kandidatiĝos por la Estraro.

Mandirola respondas, ke estus plej bone, se Ŝebrowski restus en la Estraro pro liaj vastaj kompetentoj. Se ne, neceso esplori kiu transprenu la respondecon pri kongresoj kaj kun la afrikaj samideanoj aparte decidi kiu pretas gvidi la aferon pri la Afrika IJK. Ŝebrowski lasis tre detalan raporton, estas bona kontakto kun JEBUO, la landa sekcio de TEJO en Burundo. Mandirola ne scias kiu estos elektita al la Estraro, tial li ne scias diri kiel eventuale povus esti aranĝita la divido de la laborkampoj.

En la sekreta voĉdono por Ŝebrowski sin esprimis 10 komitatanoj, por Mandirola 9 komitatanoj. Estas ankaŭ 5 sindetenaj kaj 2 nevalidaj voĉoj. Neniu el la kandidatoj ricevis pli ol duonon de voĉoj, sekve necas ripeti la voĉdonon.

Costanza Schönfeld diras, ke ŝi antaŭe ne sciis ke Mandirola kandidatas por la prezidanteco. Ŝi demandas lin pri liaj planoj kaj teamo, kun kiu li ŝatus labori. Mandirola respondas ke li laboras en alia stilo ol Ŝebrowski. Por Mandirola la prioritata afero estas eksteraj rilatoj. Krome, laŭ li, la ĝisnuna prezidanto preferas mem ellabori solvojn por prezenti ilin pretaj al la Komitato, dum Mandirola preferas diskuti kun la grupo. Resume, temas pri aliaj manieroj konduti, gvidi; estas aliaj personaj ecoj, alia stilo de laboro.

Laŭ García Gutiérrez plej gravas la evoluo de la organizaĵo, ne la personaj ŝatoj. Poór atentigas al Mandirola, kiu emfazis ke li estas fokusita al eksteraj rilatoj, ke li estis estrarano pri landa agado kaj demandas ĉu li daŭre laboros sur ĉi tiu kampo kaj kiel aspektis la ĝisnuna laboro; ĉu en la lasta oficperiodo aperis novaj LS-oj? Mandirola respondas, ke tiu laborkampo spertis pozitivan evoluon, sed la nuna stato ankoraŭ ne estas kontentiga. Poór esprimas sian esperon ke tiu laborkampo havos plurajn respondeculojn, kiel estas proponite.

Rodzianko subtenas tion, kion diris García Gutiérrez. Laŭ ŝi estas tro da emocioj en la afero, ne ĉiam bonaj. Ŝi ne trovas tute taŭga la manieron en kiu Mandirola kandidatiĝis. Jeziorowska respondas, ke la Elekta Komisiono estis malforta, grandan parton de la laboro ŝi faris sola. Estis por ŝi surprizo kiam ŝi eksciis pri la petskribo kaj ne komprenas kial Mandirola pli frue ne pli esprimis klare sian emon kandidati por la posteno de prezidanto.

Schönfeld anoncas, ke ŝi retiros sian kandidatiĝon, se Mandirola iĝos prezidanto.

Denove okazas sekreta voĉdono pri prezidanto de TEJO. La Komitato elektas Mandirola per 14 voĉoj, 8 voĉdonas por Żebrowski. 3 voĉoj estas sindetenaj.

Kubisiowski retiras sian kandidatiĝon por la posteno de ĝenerala sekretario.

Okazas elekto de ĝenerala sekretario. Kandidatiĝas Arina Osipova. Por ŝi voĉdonas 21 komitatanoj, 1 voĉo estas sindetena, 1 voĉo kontraŭ, 1 voĉo por Kubisiowski, 1 voĉo blanka.

Okazas elekto de kasisto. Por Cédric Marchal voĉdonas 23 komitatanoj, 1 voĉo estas kontraŭ, 1 nevalida.

Raymond retiras sian kandidatiĝon. Schönfeld konfirmas sian retiriĝon.

Okazas elekto de la ceteraj estraranoj. Por García Gutiérrez estas 23 voĉoj, por Juliana Evandro 16 voĉoj. Ambaŭ elektiĝas.

La Estraro de TEJO por la oficperiodo 2015–2017 konsistas el Michael Boris Mandirola (prezidanto), Arina Osipova (ĝenerala sekretario), Cédric Marchal (kasisto), Ariadna García Gutiérrez kaj Juliana Evandro.

La kunsido finiĝas je la 12h25.

### **Tria sesio (mardo, la 6-a de aŭgusto 2015)**

La kunsido komenciĝas je la 10h20. Ĝi estas kvoruma.

#### **08 ELEKTO DE LA ELEKTA KOMISIONO**

La Komitato per 16 voĉoj kaj 5 sindetenoj decidas, ke la Elekta Komisiono konsistu el 3 personoj.

Por la Elekta Komisiono sin proponas Huurman. Li asertas, ke ankaŭ Kožuchová rete sendis sian kandidatiĝon. Jeziorowska malkonfirmas. Raymond kaj Fischer-Kotowski sin proponas por la komisiono.

Por unu voĉdono Matúšov laboras sola en la voĉdona komisiono pro la kandidatiĝo de Huurman.

En sekreta voĉdono la Komitato elektas la Elektan Komisionon. Huurman ricevas 19 voĉojn, Raymond 13 voĉojn kaj Fischer-Kotowski 18 voĉojn. Ĉiuj tri elektiĝas.

#### **10 AMENDOJ AL LA STRATEGIA LABORPLANO DE TEJO 2014–2017**

La Komitato malaprobas la amendoproponon de Tran Thi Hoan (Ĝojo) per 18 voĉoj por kaj 3 sindetenoj, kaj sendas ĝin por plua traktado.

Regano prezentas amendoproponon de IEJ. La Komitato akceptas ĝin per 10 voĉoj por, 6 voĉoj kontraŭ kaj 5 sindetenoj.

La nova Estraro faras ampleksan amendoproponon, plejparte rilate la limdatojn. Ĝi estas akceptita per 20 voĉoj por kaj 1 sindeteno.

## **11 RAPORTOJ DE LA LABORGRUPOJ**

Ne venas raportoj.

## **12 JURA SENDEPENDIĜO DE TEJO – DECIDO**

Huurman diras, ke la komisiono kiu laboris en la IJK trovas la proponon pri la nova statuto de TEJO bona kaj legebla kaj faris nur unu teknikan modifon. La propono pri la kontrakto inter TEJO kaj UEA estas en pli skema stato.

Huurman proponas prokrasti la voĉdonon pri la statuto kaj ne akcepti ĝin antaŭ ol estos preta la definitiva versio de la kontrakto. La statuto ne povas funkcii sen tiu kontrakto. Mandirola respondas, ke ĉiuokaze la statuto ne ekvalidus tuj, sed nur post la aprobo de la kontrakto. Huurman preferas atenti por povi konsulti la proponon pri la kontrakto. Mandirola malpreferas tiun solvon, pro la malrapideco kaj eventualaj komplikaĵoj en la Komitato de UEA; li ne volas engaĝi la komitatojn en la aferon de kontrakto. Se la Komitato de TEJO volas pli aktive partopreni en la pretigo de la kontrakto, ĝi aprobu la statuton nun – sub la kondiĉo, ke ankaŭ la kontrakto estos poste prezentita al la Komitato por akcepto.

Venas du proponoj por decido pri la sendependiĝo de TEJO.

Propono 1 (vortumita de Żebrowski, kun subteno de Huurman)

*La Komitato de TEJO mandatas la Estraron de TEJO ellabori la finan projekton de la Kontrakto kun UEA surbaze de la Statuto montrita en la Komitatkunsido kaj sekve voĉdonigi aprobon de ambaŭ dokumentoj per reta voĉdono plej malfrue ĝis la 14-a de oktobro 2015.*

Propono 2 (vortumita de Mandirola)

*La Komitato de TEJO aprobas la novan Statuton proponitan de la Komitato de UEA.*

*La Komitato de TEJO donas mandaton al la Estraro de TEJO prezenti malneton de la kontrakto inter TEJO kaj UEA ĝis la 1-a de oktobro bazita sur la statuto de la Statuto aprobita.*

*La Komitato de TEJO rajtos malvalidigi ambaŭ la dokumentojn per reta voĉdono kiu eku plej malfrue la 14-an de oktobro 2015.*

Mandirola emfazas, ke li ne volas, ke ekzistu eblo bloki la decidon per nepartopreno en voĉdono kaj proponas aldoni en propono 1, ke la voĉdono estos valida sendepende de kvorumo. Fischer-Kotowski trovas tiam vortumon neleĝa kaj maldemokratia. Żebrowski opinias ĝin absurda; organizaĵo kiu ne povas efike organizi retan voĉdonon ne meritis esti vere sendependa, ĉar ĝi ne povus bone funkcii. Se ne estus kvorumo, tiam ni devus atendi la sekvan oficperiodon de la Komitato kaj eble tiam la organizaĵo estus sufiĉe forta por memstariĝi. Rodzianko

demandas kiel aktivigi la komitatanojn, ĉu puni ilin pro nepartopreno en voĉdonoj? Ŝi proponas pripensi tion, kiam TEJO estos sendependa. Ekzemple, se iu komitatano ne partoprenas en tri sinsekvaj voĉdonoj, tiu forfikiĝu; eblas preteratenti voĉdonon unu fojon, eble ankaŭ la duan, sed ne tri. Tio estas neglekto de la komitatanaj taskoj; en tiu kazo ni devas sciigi koncernan landan sekcion. Kaj ni prefere havu dudek kapablajn komitatanojn ol kvindek, kie duono prifajfas siajn devojn.

Poór subtenas la duan proponon. La Komitato devus akcepti la ĝeneralan statuton kaj pri la kontrakto ni traktu poste. Żebrowski atentigas, ke temas pri grava struktura ŝanĝo. Mandirola diras, ke ĉiuokaze laŭ ambaŭ proponoj estas la Komitato, kiu decidas. Żebrowski respondas ke sen la kontrakto la statuto ne havas sencon, ĉar estas la kontrakto kiu difinas gravajn detalojn.

Huurman postulas tujan voĉdonon. Videbla plimulto de la komitatanoj subtenas la proponon. Vít Guigliemo Mišurec postulas sekretan voĉdonon.

Temas pri du sendependaj proponoj, kiuj estas traktataj en unu sekreta voĉdono. La Komitato akceptas la unuan proponon per 14 voĉoj, por la dua propono voĉdonas 6 komitatanoj; 3 sindetenoj kaj 1 nevalida voĉo.

### **13 CETERAJ DEMANDOJ**

Mandirola informas la Komitaton pri la divido de la respondeckampoj inter la novaj estraranoj:

- Prezidanto: Michael Boris Mandirola – kunordigo, eksteraj rilatoj, aktivula trejnado, rilatoj kun UEA
- Vicprezidanto: Juliana Evandro – informado, kulturo, homaj rimedoj, adoleska agado, Pasporta Servo
- Ĝenerala Sekretario: Arina Osipova – edukado, kongresoj, rilatoj kun ILEI kaj Fondumo Zamenhof
- Kasisto: Cédric Marchal – financoj, subvencipetado, rilatoj kun UEA
- Ariadna García Gutiérrez – landa agado, scienca kaj faka agado

La Estraro konsistas el nur kvin personoj, tial kompreneble ili ne gvidos mem la agadojn en siaj laborkampoj, sed nur superrigardos ilin kaj nomumos komisiitojn.

Huurman demandas pri landa agado: ĉu estos divido laŭ la mondregionoj inter la estraranoj? García Gutiérrez respondas, ke tio ankoraŭ ne estas decidita, sed la Estraro varbos komisiitojn laŭ kontinentoj kaj regionoj ene de la kontinentoj. Rodzianko demandas pri la administraj subvencipetoj. Marchal respondas, ke li respondos pri ili.

Fischer-Kotowski memorigas, ke oni povas pagi al la volontulo la membrokotizon ĉe la TEJO-budo. Rodzianko proponas fari komunan foton de la komitatanoj.

Mandirola diras, ke estas bezonata engaĝiĝo kaj kontribuo de la komitatanoj kaj landaj sekcioj. Li instigas al kunlaboro kun la nova Estraro kaj dankas la antaŭajn estraranojn. La ĝisnuna Estraro ne sukcesis atingi ĉion, sed estis multe da laboro kaj daŭre oni notas pozitivajn evoluojn. Żebrowski gvidis la organizaĵon kaj malgraŭ la

rezulto de la elektoj oni devas danki lin nome de la tuta Komitato. Apartan dankon meritas Poór, kiu havis grandegan pezon en multaj agadkampoj kaj sukcesis evoluigi ilin ĝis la hodiaŭa stato. Mandirola esperas, ke estos bona kunlaboro kun Poór, kiam ŝi estos Ĝenerala Direktoro de UEA. Post la jura sendependiĝo la malgranda nova Estraro povos danke al tio plu evoluigi kaj pligravigi tion, kion faras la organizaĵo kaj disvastigi Esperanton inter la junularo.

Żebrowski dankas pro la plurjara kunlaboro: estis plezuro kaj honoro dum la lastaj ses jaroj labori por TEJO; dankon al ĉiuj pro la agrablaj rememoroj.

Żebrowski fermas la kunvenon je la 12h35.

## Listo de ĉeestantoj kaj anstataŭantoj

<b>N<sup>o</sup></b>	<b>Nomo</b>	<b>Rolo</b>	<b>Sekcio</b>
1	Łukasz ŻEBROWSKI	Estrarano	Malnova
2	Michael Boris MANDIROLA	Estrarano	Malnova
3	POÓR Veronika	Estrarano	Malnova
4	Alexandre RAYMOND	estrarano	Malnova
5	Michael Boris MANDIROLA	estrarano	Nova
6	Arina OSIPOVA	estrarano	Nova
7	Cédric MARCHAL	estrarano	Nova
8	Ariadna GARCÍA GUTIÉRREZ	estrarano	Nova
1	Bernard GNANCADJA	KomA	Beniono (BOJE) de la 2a sesio kiam BOJE estis akceptita
2	Allan ARGOLO anstataŭata de Sarah Monteiro	KomA	Brazilo (BEJO)
3	Rolando BONKORPA	KomA	Britio (JEB)
4	Vít Guigliemo MIŠUREC	KomA	Ĉeĥio (ĈEJ)
5	Meva Cuenot	KomA	Francio (JEFO)
6	Tabea MALTRY	KomA	Germanio (GEJ)
7	Timm PENNO	KomA	Germanio (GEJ)
8	Sarolta BAGÓ anstataŭata de Veronika Venislovas	KomA	Hungario (HEJ)
9	Baptiste DARTHENAY anstataŭata de Veronika Venislovas	KomA	Hungario (HEJ)
10	Michele GUERRIERO anstataŭata de Zuzana Kožuchová	KomA	Italio (IEJ)
11	Emanuele REGANO	KomA	Italio (IEJ)
12	Enric BALTASAR	KomA	Katalunio (KEJ)
13	Carlos anstataŭata de Guillermo	KomA	Kubo (JS de KEA)
14	Víctor Iván SOMBRA ARGÜELLES anstataŭata de David	KomA	Meksiko (MEJ)
15	Rogier HUURMAN	KomA	Nederlando (NEJ)
16	Pradip GHIMIRE	KomA	Nepalo (NEJO)
17	Piotr HOŁDA	KomA	Pollando (PEJ)
18	Tobiasz KUBISIEWSKI	KomA	Pollando (PEJ)

19	Arina OSIPOVA	KomA	Rusio (REJM)
20	Léon SCHNELLDORFER anstataŭata de Zuzana Kožuchová	KomA	Slovakio (SKEJ)
21	Tran Hoan (Ĝojo) anstataŭata de Nguyen Thi Nep	KomA	Vjetnamio (VEJO)
22	Alina Calibe BRÜCKER	KomA	BEMI
23	Michal MATÚŠOV	KomA	EUROKKA
24	Romualda JEZIOROWSKA	KomB	
25	Dorota RODZIANKO	KomB	
26	Ariadna GARCÍA GUTIÉRREZ	KomB	
27	Judith MEYER	KomC	